



Informoj:
Arto -:- Literaturo
Turismo -:- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakelo:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

MIA AMO

Al mia dom' irante mi vidis veturilon
portantan junfraŭlinon pli belan, ol anĝel'.
Orharoj, sorĉokuloj, rideto plej loganta...
Entute ŝi vizio nur estis el ĉiel'...

Ŝi pasis kiel fulmo kaj tamen amtrafita
por ĉiam kun ŝi iris kaptita mia kor',
mi plu ne ŝin revidis kaj amo senespera
velkigas mian bruston sub premo de l' dolor'.

Mi vagas sur la stratoj, sur ĉiuj promenejoj,
serĉante l'amatinon en tago kaj vesper'
kaj dum animo mia ŝin vidas ĉiuhore,
okuloj ne raviĝis per ŝia reaper'.

Kaj en la vintraj noktoj longegaj sendormaj
animon mian kiam agitas l'ampasi'
mi ploras malespere kaj ĉiam min demandas
ĉu estis ŝi virino aŭ estis l' Iluzi'?

Originale verkis,
VICENTE INGLADA.

MALBONO ĈE LA HOMOJ

La religioj multe parolis pri la kaŭzantoj de la
malbono, kiu malĝojigas la homaron, sed nenia
malbona genio, spirito aŭ diablo estas la insti-
ganto de malŝatindaj agoj, ĉu individuaj, ĉu sociaj.

Se ni ĵetas rigardon sur la historion por scii,
kiel vivis la unuaj homoj loĝantaj la mondon, tre
malgranda estas la diferenco inter ili kaj kelkaj
bestoj. Tamen la intelekta supereco trovas rime-
don por defendo kontraŭ la Naturo, ne ĉiam
ĝojiga, kaj ankaŭ kontraŭ la kruelaj bestoj. La
homo sin konsideras pli forta ol la ceteraj estaĵoj
dank' al sia intelekto potenca kaj li pripensas
kiamaniere utiligi la ĉirkaŭantajn al si vivantulojn
por agrabligi sian vivon.

Kelkaj homoj pli fortaj ol aliaj, ĉu intelekte, ĉu
korpe, volas satigi sian avidecon devigante la
ceterajn homojn labori ne por la komuna bono,
sed por kontentigi la avidecon de la sin nomantaj
superuloj.

La malfortikuloj komprenas, ke tio ne estas
justa, ili kuniĝas kaj pretiĝas kontraŭ la preman-
toj. Malkonsento komenciĝas kaj fariĝas senĉese
pli akra. Se la forto ne superas por venki, ruzajo

estas elpensita kaj baldaŭ la premanto kompre-
nas, ke nur sur malklereco ili povas regi. Tial al
la submetitaj homoj oni ne permesas kleriĝon.
La scienco restas kaŝita kiel proprajo de privile-
gia kasto kaj iom post iom ŝajnas natura afero,
ke la homaro estu disdividata laŭ superuloj kaj
malsuperuloj.

Do, la kaŭzo de la malbono ne sidas ekster la
homo, sed interne, nutrita de longedaŭra kaj falsa
edukado.

EMILIO ARTIGAS.

PECO DA NEĜ

Tra la vitropordoj de mia laborejo mi rigardas
falantan neĝon sur la strato. Eĉ sur ĉefa strato
de granda urbo neĝado estas bela.

Sed neĝado ĉiam min malĝajigas tial ke mi pen-
sas pri tiuj malfeliĉuloj, kiuj ne havas sufiĉajn ves-
tojn kaj manĝaĵojn dum la frostanta sezono.

Pensadis mi pri tio, kiam amika mano dolĉe ba-
tis mian ŝultron, mi turnigis mian kapon kaj vidis
post mi miajn kunlaborantinojn, kiuj ridis laŭtege
min vidante serioza.

—Venu; diris unu el ili, venu kun ni por ridi ga-
je kaj ne rigardu la blankan neĝon, forlasu viajn
romantikemojn, ne estu romantikaĉa ĉar tio estas
antikvaĵo, kiun ne devas uzi virino, kiu estas devi-
gata perlabori. Mi iris apud la grupo de tiuj gajaj
fraŭlinoj kaj ĉiuj ekparolis samtempe, tial neni-
aŭdis nek estis aŭdata, tiu kiu estis pli aĝa kaj
ŝajnis pli serioza silentigis ĉiujn kaj proponis ke
unu parolu post la alia, oni al mi invitis ke mi
donu la temon por paroli kaj mi diris:

—Ni povas paroli pri la neĝo.

—Bone; diris unu el ili, ĉu vi scias kion mi farus
tre volonte per tiu neĝo nun falanta?

—Mi ne povas diveni.

—Mi per ĝi farus kastelon kaj en ĝi enmetus
ĉiujn kiuj malamas mian religion.

Terurega afero se ni ĉiuj lernus la internan es-
perantan ideon vere paco regus la mondon.

La esperanta lingvo vere povus pacigi la mon-
don ĉar esperantisto, kiu vere sentas esperantan
amon en sia koro neniam malamas.

Li ne povas havi malamikojn tial ke li ankaŭ ne
estas malamiko.

Tiu mia kunlaborantino vere havis pecon da neĝo anstataŭ koron, same kiel ĉiuj homoj kiuj ne volas kompreni la celon de nia idealo.

Ni bedaŭras pri ili tial ke esperantisto multe amas homaron.

VERDSTELULINO.

Januaro 1932.

HEZITO

(Daŭrigo)

INTERAKTA AMUZAĴO DE JOSEFO ORÓS

Kore dediĉita al S-ro Inglada.

(Resumo de la antaŭaj scenoj: F-ino Julia, malgraŭ la konsiloj de sia patrino, faradas motivojn penante ke ŝia fianĉo ekkoleriĝu, kaj, tial, fini la amrilatojn; tamen, la fraŭlo pacience suferas ĉion zorge celante ke Julia ne elpelu lin, sed la hodiaŭa malsataĵo de la amatino igis ke finfine Ludoviko eliru).

SCENO III^a

(F-no Julia kaj ŝia patrino Karmen restas solaj en la ĝardeneto).

Julia. (Elspiregante). Dankon al Dio!! Kia granda pezo foriĝis el mi!! Sed atentu ke li neniam koleras! Mi ne vidis viron tiel malflaman kiel tiu ĉi! Eĉ por ĉesiĝi miajn amrilatojn li ne koleriĝis... Per kia trankvileco... Kompreneble, ĉar tio ne estis por li grava... Se mi estus viro kaj mia fianĉino estus farinta al mi tion da malestimoj, kiom mi al li faris, eĉ se mi multe amus ŝin, mi estus iĝinta malgajefurioza; mi elŝirus miajn harojn (aldonante gestojn al vortoj). Mi estus plej larĝe malferminta miajn okulojn kaj kun mieno tre serioza kaj malgaja mi estus diranta: (kun komikafekta ĉagreno). Vi diŝiras mian koron!!! Mia vivo estas neebla sen via amo!!! Mi finos mian malfeliĉan ekzistadon!!! Kaj mi vorte montrus al ŝi ke mi estas decidinta min jeti en la riveron, kaj mi forirus per longaj paŝoj. Kompreneble mi sidus ĉe la unua vendejo de glaciaĵoj kiun mi trovus... (ridas)... Hal... hal... (ion pli serioza)... mi ne povis suferi lin plu. Li estis por mi jam netolerebla, kaj edziniĝi kun li, ne amante lin... ĉar mi ne amis lin. Ĉu ne vere panjo?

Karmen. (Malvarme kaj ne ĉesante kroĉetriki). Ne, filino, ne.

Julia. Mi estus estinta tre malfeliĉa. Ĉu vere panjo?

Karmen. Jes, filino, jes.

Julia. Kaj mi ne devis daŭrigi tiun situacion pli longe. Ĉu vere panjo?

Karmen. Ne, filino, ne.

Julia. Ĉar se Ludoviko amas min, estus al li despli ĉagrene ju pli malfrue mi estus lin forpelinta.

Karmen. Jes, filino, jes (ĉiam laborante).

Julia. Plie, li ne amis min.

Karmen. Ne, filino, ne.

Julia. (Restas pensanta. Prenas la bombojn). Li lasis la dolcaĵojn.

Karmen. Jes, filino, jes.

Julia. Iom nervekscite). Patrino, mi tion ne demandas. Mi jesas ĝin. Mi havas la skatolon en miaj manoj.

Karmen. Pardonu, mia filino, Mi kredis ke vi demandis min.

Julia. Vere, la malfeliĉulo, kiel rekompenco por la kvinminuta malfruiĝo, donacas al mi kesteton da dolĉaĵoj. por senkolerigi min... Plie, mi ne havis motivojn por koleri... Ĉar se lia patrino estas malsana, nenio pli natura ol tio, kion li faris... kaj ŝi ja estas malsana, ĉar tion li diris al mi kelkajn fojojn... kaj li montris leterojn el sia hejmo... (ekmalgajiĝas)... Plie, ŝajnas ke li amas min... ĉar ĉiujn detalojn tion komprenigis... ĉar ŝajnigi tiomlonge estas neeble; iu ajn malgranda detalo estus denunciinta lin... Krom tio, li havas brilan profesion... kaj malbela li ne estas... Ĉu vere patrino?

Karmen. (Malatente). Jes, filino, jes.

Julia. (Malplaĉe). Ne diru ke li estas malbela, ĉar li tia ne estas.

Karmen. (Rigardante sin mirigita)... Ne, filino, ne. Certe, li ne estas malbela. Li estas belega, bonega, riĉega kaj...

Julia. (Kolere kaj duonploretante). Silentu!!!

Karmen. (Trankvile). Mi silentas...

(Silentado)

Julia. (Plorante kuŝigas sian kapon sur la brusto de sia patrino). Panjo!!! Kiel malfeliĉa mi estas!!!

Karmen. Jen bela ŝanĝo! Ĉu vi ne diris antaŭ kelkaj minutoj ke vi estas tre feliĉa? Kaj nune vi jam estas malfeliĉa? Mi ne komprenas vin.

Julia. Ĉu li revenos?

Karmen. (Ŝajnigante ke ŝi ne scias pri kiu ŝi parolas). Kiu?

Julia. Kiu, kompreneble, Ludoviko!

Karmen. (Mirigita). Ha! Sed ĉu vi esperas, ke li revenos?

Julia. Mi ne esperas; mi deziras tion; sed mi estas tiel malfeliĉa...!

Karmen. Sed, ĉu vi, nun, amas lin?

Julia. Mi ne scias ĉu tio estas nune aŭ estis ĉiam. Unue mi deziris ke li foriru el mi, mi pensis ke kun li, iris ankaŭ premiĝo el mia animo. Poste, mi dubis ĉu tio estas certa. Granda hezito kaptis min. Ĉu el mi foriris ĉagreno aŭ estis la feliĉeco kiu forkuris el mia koro?... Se deziro vidi denove Ludovikon estas ami lin, tiam mi lin amas, patrino.

Karmen. Ha, junulinoj, junulinoj, kiu per viaj hezitoj kaŭzas al vi ĉagrenojn kaj ankaŭ al tiuj kiuj vin amas. Ludoviko malgaje foriris, kaj malgaja estas via patrino, kiu nur deziras vidi vin gaja, kun hela mieno pro feliĉeco, kaj ĝuste la malo okazas.

Julia. Ĉu li revenos?

Karmen. (Faras duban kaptisignalon).

Julia. Eble li jam estas en la vagonaro veturante al sia patrino, kiu ĉiam lin amos ĉiel, kiu ĉiam regalos lin per karesoj, kaj dorlotoj!!

Karmen. Ankoraŭ vi ne scias, filino mia, kio estas ami filon.

Julia. Li ne revenos!!! (nove ploras kaŝante sian vizaĝon en siaj manoj).

(Daŭrigota.)

Monhelpantoj de «Nia Vivo»

Ni publikigas la duan liston de mondonajoj por helpi nian karan gazeton:

Sro. Betran, el Panticosa, 1'50; Sro. Albero, el Cocentaina, 3; X. X., el Madrido, 5; Dro. Loyola, el Logroño, 2; Sro. M. Vázquez, el Madrido, 3; Sro. F. Uceda, el Jaen, 3; Fratecano, el Zaragoza, 4; Sro. A. Marmol, el Villanueva de las Minas, (Sevilla), 2; Sro. L. Til, el Zaragoza, 4; Fino. P. Tramullas, el Jaca, 1'20; Esperantamanto, el Barcelono, 3; Sro. P. Tarnow, Düsseldorf, 3.

Ni korege dankas al ĉiuj.

NUR UNU FOJON

Alvenis al niaj manoj cirkulero de H. E. A., kiu aludas «Fratecon» kaj niajn prezidintojn.

Pro ĝia speciala stilo ni kredas, ke tiu broŝuro estis skribita de S-ro Mangada, kvamkam ĝi estas prezentata kiel de la Komitato.

Sur tiu skribaĵo, krom aliaj punktoj, oni diras necertajojn.

La paĝoj de NIA VIVO ne estas por diskuti; kaj nur unu fojon, flugrapide, pritraktas tian aferon ripetante publike tion kion ni private jam diris antaŭlonge. Ni estas tute pretaj submeti je la prijuĝo de komisiono la agadon de S-ro Mangada-Mojado kaj tiun de «Frateco» kaj ĝiaj eksprezidantoj.

MALNOVAJ PAĜOJ

EL HEINE

I

Dolĉe pikas min tra kor'
sonoj de aero.

Sonu vi, printempa ĥor'
sonu sur la tero;

Sonu, mi al tiuj ĉi
floroj vin deputas;
se vi vidos rozon, vi
Diru, mi salutas.

II

Se ni edziĝos, mia kor'
mi vin per uno fojo
cirkaŭos per plezuramas',
per gajo per ĝojo.

Kaj se vi estos en koler',
mi vin ne kontraŭiĝos,
ne moku miajn versojn nur:
Mi tiam eksedziĝos.

III

Amikeco, amo, oro,
oni laŭdas vin en ĥoro,
mi vin laŭdas, serĉis ĉie,
kaj mi trovis vin nenie.

IV

Ke mi vin amas mopso,
vi scias, diablan':
Pro mia sukerdono
vi lekas min sur man'.

Vi volas esti hundo
kaj ne deziras pli,
nur miaj homamikoj
ŝajniĝas pli ol vi.

A. KOFMAN.

El «Lingvo Internacia», n-roj 6.^a-7.^a junio-julio 1896.

SCIIGOJ

La Orienta Esperantista Federacio entuziasme laboradas por Esperanto. Ĝiaj filioj, precipe «Grupo Esp, Valencia», Lumradio de Cheste, Gandía, Cocentaina iris en difinita tago al urbo Gandía, akompanataj de izolitaj esperantistoj de aliaj grupoj.

La Urbestro akceptis ilin en la Urbodomo. Ĉe «Fomento Comercial e Industrial» oni regalis ilin kaj poste oni dancis.

La esperantistaro el Cheste invitis la valenciajn esperantistojn por solenigi la datrevenon de la naskiĝo-tago de D-ro Zamenhof kaj al tiu alvoko ĉeestis tie Valenciaj, Gandiaj, Katarrojaj, Benimametaj esperantistoj, kie ili estis akceptitaj de la

Urbestro je la nomo de la Urbestraro, poste oni dancis, amuzis kaj manĝis; ĉiuj kunvenis ĉe la teatro, kie komenciĝis la festo per ludado kaj kantado de la Esp. Himno kaj legado de poesiaĵoj kaj parolado de la reprezentantoj de la esperantistaj rondoj kunvenintaj kaj S-ro Marzal faris gravan paroladon.

La Federacio, pere de Grupo Valencia faris tre efikan propagandon okaze de la brulado de la Naturhistoria Muzeo de Valencia Universitato. Ankaŭ invitis al la hispanaj deputitoj por ke ili apogu ĉe la Hispana Parlamento la enkondukon de Esperanto en la dugaradajn lernejojn.

La Orienta Esp. Federacio daŭrigas la studadon de novaj planoj por realigi la organizadon pri propagando kaj turismo pere de Esperanto.

Tio estas vera laborado kaj ni kore gratulas al tiu Federacio kaj al la grupoj, kiuj tre entuziasme kunlaboradas.

En la Akademio Rubio el Madrido, S-ro Ingolda komencis esperantan kurson al kiuj alestas ĉirkaŭ 40 junuloj: inter la lernantoj regadas granda entuziasmo.

Nova Sento el Barcelona starigis propran sidejon ĉe strato Llacuna 1.

En Ceuta entuziasmaj esperantistoj fondis novan esperantan grupon nomata «Verda Stelo». Ni tutkore gratulas ilin kaj deziras, ke ili baldaŭ atingu grandan sukceson «malgraŭ la baroj de la mokuloj kaj skeptikuloj de ĉi tiu lando».

XVI^a Kongreso de K. E. F. kaj XV-aj Internaciaj Floraj Ludoj en la urbo Vendrell-Pentekosto 1933.

En tiu urbo okazos dum la venonta Pentekosta festo Kongreso kaj Floraj ludoj.

Oni starigis 4 ordinarajn temojn kaj 20 eksterordinarajn temojn, ĉiu el ili havos sian premion.

La esperantistoj, kiuj deziras konkursi la Florajn Ludojn kaj bezonas koni ĉiujn detalojn pri premioj, kaj kondiĉoj pri sendadoj de manuskriptoj, bonvolu peti informojn, enmetante unu respondkuponon, al la redakcio de «Kataluna Esperantisto», strato Valencia 245. Barcelona.

SPRITAJOJ

—Kia estas la besto, kiu havas pli bongusta la karnon?

—La bovo.

—Kia estas la besto, kiu provizas al vi de nutraĵoj kaj ŝuoj?

—Mia patro.

En la festa programo de vilaĝo, oni legas:
«Oni okazigos du kuradojn; unu de azenoj kaj alia de porkoj je libereco».

«Nur povos partopreni la loĝantoj de la vilaĝo».

—Johano! Johano! La servisto englutis mone-
ron, kion ni faros?

—Nun nenion; ni dekalkulos ĝin je la fino de la monato.

Sendube mi havas malfeliĉon eĉ kun la vilaĝanoj, kiuj venas en Zaragoza. Hieraŭ mi estis ĉe la placo de la Constitución kaj venis al mi ulo, kiu ŝajnis al mi de Grijota kaj demandis:

—Ĉu vi scias, sinjoro, kie estas la strato Coso.

—Ĝi estas tia; la plej malsaĝa scias ĝin.

—Ja, ja; tial mi demandis ĝin al vi.

—Ĉu vi bone scias vian profesion de enteri-
gisto?

—Jes, sinjoro.

—Kie vi ellernis ĝin?

—Per korespondado.

En la Muzeo.—Du homoj parolas antaŭ mal-
bona bildo.

—Kiom kostos tiu pentraĵo?

—Du pesetojn.

—Hol, ne, la pentroŝtofo jam kostis pli, ol tiu mono al la pentristo.

—Certe, sed tiam la pentroŝtofo estis pura.

ANEKDOTOJ

Malherbe bezonis multe da tempo por pretigi verkon. Oni diras, ke li pasigis tri jarojn dum verkado de odo por la unua prezidanto de Verdun', pri la morto de lia edzino, kaj ke la prezidanto estis jam reedziĝinta antaŭ ol ricevi la verkojn de Malherbe.

(Talley des Réauv, Historio).

La Grabielli, fama kantistino, postulis 5.000 dukatojn de la imperiestrino, kiel pago por kantadi du monatojn en Peterburgo. La imperiestrino tiam respondis: «Mi ne salajropagas tion multe eĉ miajn ĉefmarŝalojn (feldmarŝalojn): —Tiaokaze, rediris la Grabielli, via imperiestrina Moŝto nur devas kantigi siajn ĉefmarŝalojn». La imperiestrino pagis la 5.000 dukatojn.

(Chamfort).